

AKTUALA ENPENSIĜO

Pro la rezulto de la elekto de la usona prezidento oni ne povas ĝoji. Eĉ ne pro tio, ke en venkinta Barack Hussein Obama povas plenumi vortoj, kiujn aŭdis jam en la tempo antaŭ Kristo lida reĝo Kroisos: „Se vi komencos batalon (transpaŝinte riveron Halys), vi pereigos grandan regnon“ – okazis: li pereigis sian propran.

La pereco minacas el ekonomiaj akvoj de diluvo, el danĝera balancado inter recesio kaj hiperinflacio surrante de „budĝeta klifo“. Al tiu ĉi krutaĵo alkondukas denove elektitan prezidenton jam konataj konfliktoj inter demokratanoj kaj respublikanoj en senato kaj precipe en Ĉambro de Rerezentantoj. Ili koncernas la manieron, kiel savi sub ŝuldoj vivantan usonan socion. Ili esprimas klopodon ne farti pli malbone, ne perdi eksterteritoriecan pozicion de grandpotenco, kio rilatas ekonomion: batali kontraŭ krizo, en lasta bataliro konservi akirojn de bonstato.

En tiu ĉi endanĝerigo sonas liberiganta vorto de Jesuo: „Kiel malfacile riĉulo eniros regnon de la ĉielo!“ (Mat 19,23).

Detruado de la granda superpotenco, per ĝia dismuntado je ŝtato kun duaranga pozicio inter ĉefaj ludantoj (kaj poste ankaŭ inter spektantoj sur tribuno) jam komenciĝis laŭ la sama scenaĵo kiel falo de potencaj ekonomiaj kaj armeaj imperioj. Klasika ekzemplo, kaj ne tute ununura, estas Roma Imperio de Aŭgusto ĝuste en la periodo, kiam ĝi travivis sian „eternan pacon“ kaj „oran tempon“. Kio estis kaŭzo de ĝia degenero kaj fina disfalo? Dekadenco, disfalo de familioj, malvirteco, perverseco propagandita eĉ sur publikaj lokoj, prezentanta ankaŭ dum teatra prezentado – kaj sekve devigo de la kristanoj, eĉ sub minaco de torturado kaj morto, ke ili al tiu ĉi revolto kontraŭ Savinto aliĝu.

Ĝuste dum regado de Aŭgusto naskiĝis Jesuo Kristo. En tiu ĉi periodo poste la kristanismo montris per sia ekzemplo de fide-

leco al sanktecaj kaj tradiciaj valoroj al pli profunda kaŭzo de senmoraleco kaj al ĝia solvo: ĝi kulpopravis la paganan socion, ke mankas al ĝi interligo kun Dio. Ĝi malkovris anstataŭon de la vera vivo de la animo kun Dio per anstataŭaĵoj de la spirita vivo. Tiuj enkondukas la homon en nerealan spiritan vivon. En ĝi diablo al la animo alfluistradas, ke ĝi adoru Dion en si, kaj diskrete al ĝi anstataŭ Dio en la koro almetas sian propran vizaĝon, komence kovritan per masko de koncerna „sincera“ serĉanto de Dia regno. Tiun „religion“ de egoismo ekkonis nun postmilitaj Usono kaj Eŭropo. Ili iras en postsignoj de la Aŭgusta regno precipe per akcepto de novtempaj „religioj“ de egoismo, inter kiujn apartenas movado New Age kaj ekzercado de jogo speciale aranĝita por tiuj celoj.

Rompon de la ligo kun Dio en la propra koro oni indikas per klasika vorto: peko. Temas pri la persona peko, pri libervola kaj konscia malobeo aŭ malatento de la Leĝo. Sankta Patro Benedikto la 16-a trafte skribas en sia libro Jesuo de Nazareto: „La Leĝo, Torao estas mem la Dia Filo, Kristo“, Filo de la Virgulino Maria, nazareta junulino. Starigi sur la unuan lokon kiun ajn alian aŭ kion ajn alian estas klara malobeo de la Leĝo – difekto de la rilato de amikeco inter Savinto Jesuo kaj la homo. De ĉi tie eliras malamikeco, kiu plene sin montras en la familioj, ekleziaj kaj civitanaj komunumoj kaj kiuj ilin fine disponigas – simile kiel regnoj de Aŭgusto kaj Kroisos – al fina detruo.

Amiko de Jesuo, la sankta Paŭlo, tiun ĉi vojon de detruo priskribas:

„Evidentaj estas la faroj de la karno, kiuj estas malĉasteco, malpureco, voluptemo... malamikeco...: la homoj, kiuj tion faradas, ne heredos la regnon de Dio. Sed la frukto de la Spirito estas amo, ĝojo... fideleco... sinregado.“ (Gal 5,19-23)

Tiujn ĉi fruktojn ni povas ĉiam pli forte

vidi sur kristanoj de „Benedikta generacio“, en la kazo de Usono eĉ sur ĝia kelkcentmembra kolegio de episkopoj. Tiuj estas precipe nun ekzemplo de „unueco de la koro kaj la menso“, ekzemplo de rezistema komuneco de la Eklezio. Ili elmontras en tiu ĉi tempo fidelecon al la Papo, Magisterio. En antaŭa prezidenta balotperiodo de Barack Obama montris ĝuste la reprezentantoj de la usonaj kredantoj firman unuecon kaj klare, publike ili esprimis reziston kontraŭ lia subteno de abortigoj kaj registritaj partnerecoj, kontraŭ ĝia senmoraleco, malantaŭ kiu sin kaŝas peko de malfideleco je ofero de Jesuo Kristo: ili montris fruktojn kaj liberecon de la Spirito en komuneco de la Eklezio.

Dume povas kristanoj al Barack Obama

kaj al la ceteraj subtenantoj de hedonismo proponi elirsolvon el la malheleco. Ili povas diri: Lot sendube elektis por si pli bonajn ekonomiajn parametrojn, li troviĝis en centro de kavaĵo de la malvirto, sed Abrahamo, la patro de la kredantoj, akompananta Dion en la Plejsankta Triunuo survoje al Sodoma kaj Gomora, petas, preĝas. Lot estas savita. Li akceptis ambaŭ anĝelojn. Tiuj antaŭsignas vojon al ricevo de la Sankta Spirito, bapton kaj konfirmacion, akcepton en la reĝejon de Jesuo.

„Mia regno ne estas el ĉi tiu mondo!“, diras nia Sinjoro antaŭ Pilato. Ĝi ne estas el tiu ĉi mondo. Ĝi estas nek de Aŭgusto, nek de Kroisos. Ĝi estas en la Eklezio. ■

P. Oldřich (Semajngazeto Světlo 47/2012)